NORMANDA ESPERANTO BULTENO

Redaktas Maurice HUET, 63 Bd François 1er, - 76 - LE HAVRE - Junio 1967 = n° 81

# Sub varma suno la 29-an-30-an de Aprilo okazis en Yvetot la 35-a Kongreso de l' Unuiĝo Normanda

Sabaton, la 29-an de Aprilo, je la 21-a, okazis, en la urba teatro de Yvetot, varieta vesperaĵo. Proksimume 50 personoj ĉeestis tiun agrablan kunvenon.

Unue, F-ino Soko Horie, ĉarma Japanino, elektita Fraŭlino Esperanto, por nia plezuro vestita per kimono, paroladis pri la vivo en Japanujo. Belegaj diapozitivoj ilustris tiun paroladon.

Poste, la grupo de la Junulardomo en Yvetot, bele dancis folklorajn dancojn eŭropajn.

Fine, S-ro JOUIS, kiu montris al ni ke li estas, ne nur bona kasisto (tion, ni ja sciis!) sed, ankaŭ, tre bona fotisto, projekciis lumbildojn pri la ĉefaj okazintaĵoj Esperantistaj en Normandio.

Dimanĉon, la 30-an de Aprilo, je la oka, Sacerdoto CHERFILS, diservis en Esperanto, en preĝejo Sankta Petro.

La kongreso mem komenciĝis per malferma parolado de Prezidanto HUET. Liaj unuaj paroloj temas pri la subita morto de Alberto LETENDRE. La ĉeestantaro silentas dum unu minuto.

S-ro HUET diras ke ni bonŝancas havi sindoneman amikon, S-ro Petro POTTIER, kiu kun sia edzino, konsentis akcepti tiun kongreson. S-ro POTTIER, li diras, estas kvazaŭ "mal-Atilo", ĉar "kien li metas la piedon, tie kreskas la verda stelo". Je la nomo de l'Unuiĝo normanda, li dankas Gesinjoroj POTTIER kaj S-ro HIS, pro la laboro farita.

Poste, nia Prezidanto elparolas siajn pensojn. Survoje al Yvetot, li admiris la belan kamparon normandan, kie la floroj de la pomarboj promesas belan rikolton, kie paŝtiĝas la bovinoj; tie-ĉi, "ĉio estas en ordo". Sed, tre malproksime de ni, ankaŭ estas simila kamparo, sed "ĉio NE estas en ordo.", ĉar, je ĉiu momento, povas, de la ĉielo, fali morton sur ĉiujn kaj ĉion: homoj, bestoj, kreskaĵoj, domoj ... Sed, ni ne rajtas diri:"Tiu afero ne estas nia, ĉar Esperanto ne estas nur lingvo; Esperanto estas frateco, Esperanto estas amo al l'homaro."

Per alvoko al grandskala disvastiĝo de nia lingvo, sin turnante precipe al la junularo, S-ro HUET finas sian paroladon, kaj deklaras malfermata la 35-a Kongreso de l'Unuiĝo Normanda de Esperanto.

Post kiam la ĉeestantaro kantis la Espero'n, S-ro POTTIER ekparolas, je la nomo de la loka kongres-komitato. Li diras kiel li organizis (majstre, substrekas la redaktanto) tiun kongreson, helpata de sia edzino kaj de S-ro HIS. Kvankam ne ekzistas en Yvetot vera grupo de Esperanto, la etoso ŝajnas favora. Efektive, sep

urbaj eminentuloj akceptis esti honor-komitatanoj, kaj pluraj komercistoj propagandis en siaj montrofenestroj. S-ro POTTIER dankas tiujn personojn.

Kiel kutime, S-ro JOUIS konatigas sian financan raporton. La kongresistoj, per aplaŭdoj, aprobas tiun bonan administradon.

Poste, la delegitoj de la diversaj grupoj raportas: S-ro CHAMARET, pri propagando en Usine Renault, en Cléon; S-ino VINCENT, pri la efika laboro en Lès Andelys (kie ŝi organizis plurajn interesajn renkontojn); S-ro JOUIS, pri Rouen-Sotteville, Sinjorino LUCAS pri LE HAVRE, S-ino RAULT, pri Lisieux, etc ... S-ro PERMANNE, kiu baldaŭ estos emeritulo, promesas veki la Fecampa'n grupon; eble, tiu renaskiĝonta grupo akceptos la proksiman normandan kongreson en 1969.

Fine, la kongresistoj voĉdonis la novan estraron, per sekretaj bultenoj. Estas elektitaj: S-ro HUET, Prezidanto; S-ro POTTIER, Vicprezidanto; S-ino POTTIER, Sekretariino; S-ro JOUIS, Kasisto, S-roj CHAMARET kaj MAMMAUX, S-ino VINCENT, Membroj. La estraro devos trovi bulteniston. Kompreneble, S-ro BOSC ne estis elektonta: li estas Honor-Prezidanto dumviva.

La Kongreso estas fermata je la 12-a.

---

INFORMKUNVENO DE "UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO"

Prezidas S-ro GUILLAUME, ĝenerala sekretario de U.F.E. S-ro BOURDAUX raportas pri la agado de la asocio, kaj konstatas ke multaj anoj de l'Unuiĝo normanda aliĝas al U. F. E.

S-ino VINCENT kritikas la enhavon de la Normanda Bulteno, kaj diras ke la federacio de U.F.E. fakte ekzistas. Ŝi proponas ke l'Unuiĝo normanda fariĝu la federacio de U. F. E.

S-ro HUET respondas: Li ne akceptas la riproĉojn pri la bulteno, ke li mem paĝopreparas, presas kaj sendas. Kion presi kiam oni ne ricevas informojn? Unu fojon plue, la Prezidanto de U.N.E. diras ke li ne povas akcepti ke l'aliĝo al nia Unuiĝo postulas necesan aliĝon al U.F.E. Li tre ĝojas ke S-ino VINCENT, kasisto, kaj S-ro POTTIER, sekretario, nun zorgas pri la "Union Française pour l'Esperanto" en Normandio, sed li energie diras ke l'Unuiĝo Normanda deziras konservi sian propran vivon, kaj, tiel, povi akcepti ĈIUJN Esperantistojn normandajn. Tamen, ni ĉiam konsilas al niaj anoj la kroman aliĝon al nacia kaj internacia asocio, laŭ la elekto de ĉiu.

---

AKCEPTO DE LA URBESTRO DE YVETOT AL LA KONGRESISTOJ

Je 12 ½ Doktoro BOBEE, Ĝenerala Konsilanto, Urbestro de Yvetot kaj diversaj eminentuloj urbaj oficiale akceptis nin, kaj oferis honor-vinon. Poste, ĉiuj grupiĝis sur la monumenta ŝtuparo de la urbdomo por la tradicia foto.

Bankedo okazis en hotelo "Aigle d'Or"; la manĝaĵo estis bonega, la etoso agrabla. Fine, S-ro POTTIER montris al ni ke li posedas verajn kvalitojn kiel aŭkciisto! Efektive, li vendis, por la profito de la L. K. K. kolorogitajn desegnaĵojn, arte verkitajn de S-ro BOSC, kaj la prezoj estis sufiĉe altaj; sed, la humoraĵaj akvopentraĵoj de nia Honor-Prezidanto estis tre allogaj, kaj la "batalo" estis varma, precipe inter du aĉetontoj!

VIZITO DE LA PREĜEJO SANKTA-PETRO KAJ DE LA AGRIKULTURA LICEO

Posttagmeze (verdire, estis jam la 16-a!) ni vizitis, sub gvidado de Pastro CHERFILS la Preĝejo Sankta-Petro, kies artvitraĵoj estas belegaj.

Poste, ni estis akceptataj de S-ro de BESSE, Direktoro de la Agrikultura Liceo.

Tiu liceo estas tre moderna. La lernantoj disponas tre bone ekipitajn laboratoriojn, kaj praktiklaboro-klasojn. Plue, la liceo posedas bestojn: bovoj kaj bovinoj, ĉevaloj, kaj grandajn ĝardenojn kie oni kultutas plejdiversajn kreskaĵojn.

Tiel finiĝis tiuj du kongresajtagoj. Ankoraŭ, dankon al la organizintoj.

---

## - KOLOR FILMO PRI NOV-ZELANDO, ESPERANTO PAROLATA

La grupoj, kiuj deziras projekcii tiun belan filmon (16 m/m ) povas sin turni al U. F. E., 34 Rue de Chabrol, Paris X°, kiu povas ĝin pruntedoni senpage.

---

## ЛЕНИНГРАД - ГАВР

Feliĉe, estas per latinaj literoj ke skribis al la Havra Grupo de Esperanto la Esperanto Klubo en Leningrado. Ili diras ke, ĉar Leningrado kaj Havro estas ĝemel-urboj (efektive, ambaŭ la Urbestroj de Leningrado kaj Havro subskribos la oficialan dokumenton la 15-an de Julio), ankaŭ niaj grupoj povas ĝemeliĝi.

Kelkaj membroj de la estraro de la Havra Grupo, S-ino LUCAS, Prezidantino, S-ino COLLEU, Sekretariino, S-roj MAMMAUX kaj HUET estas akceptitaj de S-ro René CANCE, Urbestro de Havro, al kiu ili konatigis la deziron de la ambaŭ grupoj. Lia urbestra moŝto diris ke li esperas ke la rilatoj inter la du grupoj ne estos nur leteraj, sed ke Havranoj iros al Leningrado kaj Leningradanoj venos Havron. Tiuokaze, ili estos oficiale, kaj kore, akceptataj de la urbestraro de Havro.

---

## ESPERANTO KOLEKTADO

Okaze de la ĵus pasinta Normanda Kongreso en Yvetot, mi proponis ke, en la Normanda Bulteno, aperu listo de Esperantistoj, kiuj kolektas esperantaĵojn: poŝt-markoj, unuatag-kovertoj, poŝtstampoj, glumarkoj, poŝtkartoj, k.t.p.

Mi esperas ke ĉiu kolektanto de nia regiono bonvolos respondi al mia propono ĉar, tre certe, la sciiĝo de la nomoj de la kolektantoj permesos la interŝanĝadon.

Ankaŭ, se ili dezirus, oni povus indiki, en la Bulteno, la diversajn kongresojn, kunvenojn, la kialojn de la eldono de Esperantaĵoj, kaj, laŭ ebleco, la adresojn, kie oni povos mendi la aĵojn.

Ĉiu kolektanto ne povas esti EKIK-, ILF-, ILEK-ano, aboni ĉiujn esperantajn revuojn. Do, mi opinias ke tiu rubriko helpos al kelkaj el niaj amikoj por pliriĉigi sian kolekton.

Same, pri la nekolektantoj: tiu rubriko montros al ili ke, tra la mondo, okaze de diversaj manifestacioj, oni uzas tiun propagandon, kaj, tio estas multe pli grava ili supozas.

Se vi deziras ke tiu propono efektiviĝu, skribu al S-ro Gustave CHAMARET, 59 rue Jean-Jaurès, 76- SAINT-AUBIN-lès-ELBEUF; vi bonvolos konatigi viajn sugestojn. Ne forgesu indiki viajn nomon kaj adreson!

Gustave CHAMARET.

# *Votre Trésorier vous parle...*

Vous venez de lire, dans ce **Bulletin**, le compte-rendu des débats de l'Union Normande d'Esperanto au Congrès d'Yvetot, ainsi que le compte-rendu de la réunion d'information de l'Union française pour l'Esperanto, présidée par M. Jean GUILLAUME.

De cette réunion d'information, il résulte que U. F. E. a demandé à Madame VINCENT, institutrice, rue des Oiseaux, 27 - LES ANDELYS, de percevoir les cotisations pour U. F. E. et U. E. A.

En conséquence, vous pouvez, dès maintenant, faire parvenir au Compte courant postal de Mme Jeannine VINCENT, 27-LES ANDELYS, C.C.P. ROUEN 574-88 M, toutes les cotisations concernant U.F.E. et U.E.A.

Par contre, il n'y a pas de changement en ce qui concerne l'UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE. Le C.C.P. est ROUEN 283-40 E, et votre trésorier est toujours Edgard JOUIS, 621 Rue Georges-Mugnier, 76 - BOISGUILLAUME.

La cotisation à l'Union normande reste fixée à 2 Frs (minimum) pour 1967.

IL EST RAPPELE QUE L'UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE EST OUVERTE A TOUS, quelle que soit leur appartenance, c'est-à-dire: aucune, ou U. F. E., ou S. A. T., etc... Mais, bien entendu, il est souhaitable que, en dehors de son adhésion à l'Unuiĝo Normanda de Esperanto, chacun soit également "ano" de telle ou telle association nationale et internationale de son choix.

Edgard JOUIS,
Trésorier.

*last minute !*

S-ino Jeannine VINCENT ĵus sciigis al la estraro de U. N. E. ke ŝi volonte konsentas zorgi pri la Bulteno.

Do, de nun, ĉiuj informoj presotaj en nia bulteno estos sendotaj al:
S-ino J. VINCENT, Rue des Oiseaux, 27 - LES ANDELYS.

# ĈU NI DORMAS ?

Estas kutimo en la Esperantaj Kongres (et) oj plendi pri la dormemo de la anoj. Sedstrange estas ke, kiam vi parolas aparte al tiuj samaj Esperantistoj, vi malkovras ke preskaŭ ĉiuj havas sufiĉe viglan poresperantan agadon: multaj korespondas, aliaj regule abonas unu aŭ plurajn gazetojn, ĉiuj favore parolas pri Esperanto en sia medio, iuj instruas al unu aŭ kelkaj najbaroj aŭ kolegoj. La plej viglaj faras artikolojn por la gazetoj, aŭ gvidas kursojn, aŭ respondecas pri lokaj, fakaj aŭ ĝeneralaj societoj, ekz. kiel delegito, aŭ fakdelegito, prezidanto, sekretario, kasisto, k.t.p. Ankaŭ, multaj vojaĝas pere de Esperanto, aŭ akceptas eksterlandanojn kaj gastigas ilin malavare.

Sed, tiu konstanta pli malpli granda agado estas malfacile enkalkulebla, precipe ĉar la Esperantistoj ne povas samtempe uzi sian ofte mallongan tempon liberan por raporti pri tiaj agadoj. Sed, ni bone konsciu ke , sen tiu konstanta disa agado, Esperanto jam ne plu ekzistus. Do, ŝajnas al mi, maljuste ĉiam plendi pri tiuj Esperantistoj kiuj nenion faras!

Sed, kiuj plendas? Nu, ofte gvidantoj, kiuj mem multe laboras por Esperanto, sed, dank'al specialaj eblecoj, ĉu pro metio lasanta amplekson liberan tempon, ĉu pro altaj salajroj, ĉu pro helpo de familianoj ... ĉu, ankaŭ, pro eksterordinara vivenergio. Post kelkaj jaroj, ili ne plu konscias pri la malfacilaĵoj de tiuj kiuj ne havas ilun saman bonŝancon kaj, ĉar ili vidas, ke la projektoj, kiujn ili ame pricerbumis, ne povas rapide realiĝi, ili fariĝas amaraj, kaj akre kritikas tiujn, kiuj, ŝajne nenion faras!

Sed, ni vidu alian kaŭzon de sindeteno. Tutordinare, Esperantisto, bedaŭrinde, havas kialojn ne enmiksiĝi en la naciajn aŭ internaciajn societojn. De kiam li bone legas la ĵurnalojn kaj partoprenas en la Esperanto-movadoj, li povas, senfine, legi pamfletojn, ĉu en la gazetoj mem, ĉu sur apartaj cirkuleroj, kie la gvidantoj sin interatakas, aŭ atakas ne plaĉante al ili aliajn societojn, aŭ konkurencan eldonsocieton... Nu, se ĉiu irus glate inter la ĉefuloj, estus pli facile por la ordinara esperantisto sekvi la konsilojn pri unuiĝo!

Je tiu punkto, mi volas emfazi ke la Normandanoj kreis sian U.N.E., ĝuste je momento, kiam malakordoj malagrable sonis ĉe iliaj oreloj, kaj, kiel ni plurfoje akcentis, ĝi daŭros tiom da tempo kiom ili konsentos resti kune, sendepende de la unuopaj apartenecoj, al tiu aŭ alia parokio. U.N.E. ne deziras anstataŭi lanaciajn aŭ internaciajn societojn. NE, TUTE NE! Ĝi eĉ rekomendas al siaj anoj aliĝi al tiuj, kiuj konvenas al ili. Ni ofte indikas la kotizojn por tiuj societoj, kaj kie pagi. Ni precipe ĝojas ke nun U.F.E. trovis por Normandujo sindoneman personon kiu okupiĝos pri la materiala laboro de UFE-UEA.

Nia zorgo, kiel Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj, restas kunigi malkare kaj largânime ĉiujn bonvolulojn, en nia eta patrujo normanda, ĉu per la Bulteno, kiun ni esperas pli ofta, ĉu par la kongresetoj, kiuj, samtempe, alportas okazon revigligi la movadon sur iu punkto de nia teritorio.

Antaŭ ol esti civitano de la tuta mondo, ĉiu estas amanto de sia naskiĝloko, kaj, nur tiu kiu dece sin kondutas, kie li vivas, tiu povas alporti al pli larĝa grupo, la principojn de frata kompreno.

Edgard JOUIS.